# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.

No 6. Aŭgusto - Septembro 1953 Aperas laŭbezone

D-ro Augustin P i t l í k 70jara.

La 24an de julio 1953 sepdekjariĝis malnova pioniro kaj ŝatata membro de nia klubo dro Augustin Pitlík.

Pli ol 50 jarojn estas lia vivo ligita kun Esperanto kaj longega estas la vico de liaj meritoj kaj laboroj por nia kara lingvo. Li estas la dua, kiu en la historio de Esperanto veturis kun Esperanto tra la mondo prelegante. Li estis fondinto kaj animo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto. Unua en la mondo li paroladis esperante per radio! Li estis ĝenerala sekretario de la XIIIa Universala kongreso de Esperanto en Praha, komitatano de la Asocio, prezidanto de la Klubo, lektoro de Esperanto ĉe alta teknika lernejo, ekzamenanto pri Esperanto kaj kelkobla oficiala reprezentanto de ĉeĥoslovaka registaro dum la universalaj kongresoj! Liaj paroladoj en Esperantista klubo en Praha estis sennombraj kaj estas ĉiam postulataj de la membraro.

Sepdek jaroj atingas dron Pitlík en plenaj korpa kaj anima freŝecoj kaj en konstanta poresperanta laboro. Ke li ankoraŭ longe estu aktiva, ĉiam sana kaj kontenta deziras al li la komitato kaj membraro de EKP.

\- - -

Samideano Jiří K ř e n e k kun samideanino Marta J o n á š o v á surprizis nin per jena informo: "Nezlobte se proto na nás, že jste při tom nebyli, když na rynku staroměstskm jsme se ženili 3.7.1953."
En la nomo de la tuta klubo ni elkore gratulas!

\- - -

Einar A d a m s o n mortis ...
Mortis la 11an de junio unu el la plej konataj svedaj esperantistoj, Einar Adamson, komitatano kaj sveda ĉefdelegito de UEA. Li estis vera idealisto, kiu kun idealismo kaj sen timo batalis dum sia tuta vivo por siaj ideoj. Funebras kaj memoras lin multaj liaj ĉeĥoslovakaj amikoj.

\- - -

Kun grandaj plezuro kaj ĝojo ni legis la nomojn de niaj gemembroj en la nomaro de premiitoj en ĉi jara Belarta konkurso de UEA. S-anino Eli Urbanová konkeris trian lokon en originala poezio per sia poemo "Renkontiĝo". S-ano Štěpán Urban okupis kvinan kaj sepan lokojn en originala prozo per siaj verkoj "La sorĉisto" kaj "La ferioj kun la muzo". Sincere ni gratulas!

\- - -

La fama filozofo František K r e j č í , profesoro de la universitato en Praha, diris en artikolo verkita por "Bohema Esperantisto" en 1909:

Esperantismo fontas en tion, kio, kreante esencon de la homeco, estas ĉefa risorto de kultura evoluo ...

\- - -

Nia klubo aranĝas ĉiumerkrede programajn klubajn vesperojn en aparta ĉambro de restoracio "U Šumavy" Praha II., Štěpánská 3.

La programo de plej proksimaj kunvenoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2/9 | 1953 | Ota Ginz | : Kiel utiligi Esperanton en nuna tempo |
| 9/9 | | Josef Vítek | : Koncentrejano J.Novák trovita helpe de Espo |
| 16/9 | | Inge Bartošíková | : Frislando - verda lando |
| 23/9 | | Jan Zemek | : Hindujo - la lulilo de l'homaro |
| 30/9 | | La poezio kaj la prozo de s-ino E.Urbanová kaj s-o Š.Urban, kiuj estis premiitaj en ĉi jara Belarta konkurso de UEA | |
| 7/10 | | Kantoj kaj poezio en Esperanto | - kantas s-ino Ledková |
| | | Bapto de Caro Vladimiro | - recitas s-o Š.Urban |

\- -

Samideanoj, kiuj volas korespondi kun eksterlando ricevos adreson de eksterlanda korespondemulo por 30 heleroj de s-ano Eduart H u t h, pošt. přihrádka 26, Hlučín.

\- -

EL POPOLA ĈINIO ĉesis aperi. En letero ricevita el Pekino esprimas la eldonejo de EPĈ sian bedaŭron, ke ĝi ne plu povas eldoni tiun revuon nek presi la anoncitajn diversajn Esperanto-librojn. Ni partoprenas en tiu bedaŭro, sed preferas ne eldoni ĉi tie ion pluan. La lasta numero de EPĈ estis tiu de aprilo.

\- -

11-a n-ro de "Heroldo". Unu ekzemplero revenis, ĉar adresa slipo defalis. Kiu el la regulaj ricevantoj de Heroldo ne ricevis tiun nron, skribu!

\- -

Artikolo pri Jan Amos Komenský sub titolo "Jan Amos Comenius, protagonisto de artefarita lingvo internacia" de H.K.Bouška okupas la unuajn paĝojn de la 6a nunjara numero de la amsterdama revuo "La Progresanto". Ĝi estas eltiro el pli granda verko, kiun preparis nia membro H.K.Bouška, unu el la fondintoj de nia Klubo.

\- -

"Ĉeĥo en Islando" estas artikolo de nia membro Ota Ginz, kiu aperis en aprila nro de "Esperanto" de UEA. Ĉi tien alvenis sole nemultaj ekzempleroj de tiu kajero, kvankam temas pri historio el la jaro 1613.

\- -

La hispana urbo Manresa eldonis belan gvidlibreton esperantlingvan. Ĝi alvenis bone kaj rapide el Hispanujo laŭ nia adreso, kvankam niaj poŝtaĵoj al tiu lando ne estas akceptataj ĉe nia poŝto.

\- -

Jiří Prajzler, Kamenný Újezd, Rokycany ČSR. Tiun adreson ni trovas en la rubriko "Korespondado" de la organo de KELI "Dia Regno". Preskaŭ en neniu numero de fremdlandaj niaj gazetoj, kie ajn aperantaj, mankas adreso de ĉeĥoslovaka korespondemulo. Tio atestas, ke ni estas multaj kaj ke multaj el ni avide serĉas rilaton kun amikoj diversnaciaj. Krom danko al "Dia Regno" ni esprimas nian laŭdon, ke ĝi trovis manieron, kiel enmanigi al ni siajn brilajn kajerojn, sendinte ilin per registrita poŝto.

\- -

Kiel oni nun afrankas leterojn por eksterlando:
Aerpoŝta alpago estis nuligita por tuta Eŭropo. Normala letero por ĉiuj landoj de tuta mondo Kčs -,75, poŝtkarto -,45, aerpoŝta alpago por ekster-eŭropaj landoj estas -,80 por ĉiuj 5 gramoj! Favorafrankoj por Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo kaj Polujo: letero 60 hel., poŝtkarto 30 helerojn.

\- -

EBLIGU PLUAN APERADON DE NIA BULTENO per dediĉo aŭ vendo de la necesa papero, kiu ne estas nun normale aĉetebla. Sendu ĉiun disponeblan kvanton tuj al la prezidanto de nia Klubo s-ano Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I kun indiko de la sumo pagota!

\- -

Tiu ĉi numero aperas en 600 ekzempleroj.

\- -

Závodní klub ROH - AZNP Mladá Boleslav a letní kolej
Esperanta-Doksy, zvou všechny odboráře esperantisty na

<u>LETNÍ KULTURNĚ REKREAČNÍ POBYT NA HRADĚ KOSTI v Českém ráji</u>

<u>Od 5. srpna do 15. srpna 1953.</u>

<u>Program:</u>
Studijní kroužky pro začátečníky, pokročilé (konversačně-řečnický) seminář z esperantologie, recitačně umělecký večer s recitační soutěží, akademie, večer kouzel, taneční večery při hudbě osvětové besedy z Ml. Boleslavi za vedení R. Rejnarta. Toulky napříč Českým rájem s odborným výkladem, koupání v labutím jezeře pod hradem.

Hrad Kost leží uprostřed krásných hlubokých lesů a rybníků, v krajině romantické, plné půvabných zákoutí, hradu a zřícenin.
Prachovské skály, Hruboskalsko, Turnovsko.

<u>Ubytování:</u>

Posluchači budou ubytováni jednak v hotelu a v nově zřízené noclehárně Čedoku, případně v soukromí. Poplatek včetně kolejného, ubytovného s dávkou a režie podniků zábavných a společenských,
činí Kčs 205,-.
Ubytování v hotelu připlácí se dle platných hotelových tarifů. Stravování na vlastní účet účastníka v hotelové restauraci. Účast omezena pouze na 60 posluchačů, proto se přihlaste ihned.

Přihlášky na adresu Karel Šolc, Mladá Boleslav III., Janáčkova 566. Způsob placení bude každému sdělen po přihlášce, která bude platná pouze po zaplacení vzhledem na nedostatek bytů.

S odborářským pozdravem:

Závodní klub ROH - AZNP Mladá Boleslav a letní kolej Esperanta